# EKO 2025

**Bleko kun eĥo**

EKO 2025-04. Januaro 23. Pezo: 300 KB

## Ekiro al Ĉeĥio, turno al Burno

Je la fino de 2024 jam 679 personoj el 53 landoj aliĝis al la 110-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos ekde la 26-a de julio en Burno (ĉeĥe: Brno). Vidu la laŭlandan aliĝstatistikon kaj komenton pri ĝi en *La Ondo de Esperanto* https://sezonoj.ru/2025/01/brno-7/

**SMG:** Je la 23-a de januaro la aliĝoj sumis je 713 el 55 landoj. Elstaras Ĉeĥio 86, Germanio 75, Francio 58, Koreio 31, Ĉinio 30, Hungario 26, Nederlando 21, Brazilo 19, Slovakio 18, Belgio 17 kaj Usono 17.

**La kongresa temo** de la 110-a UK estas “Esperanto kaj teknologioj kiel pontoj de paco kaj konfido inter la popoloj”. **La emblemo** de la 110-a UK reprezentas la Katedralon de Sanktaj Petro kaj Paŭlo, imponan romkatolikan konstruaĵon, kiu elstaras en la pejzaĝo de la urbo, kaj estas grava nacia kultura monumento en Ĉeĥio.

**La Loka Kongresa Komitato** konsistas el Prezidanto: Jiří Tomeček, Vicprezidanto kaj giĉetoj: Libuše Hýblová, Sekretario kaj kongresejestro: Milan Kolka, Kasisto: Andrea Švubová kaj pluraj pliaj organizantoj.



## De Esperanto-urbo ĝis Esperanto-arbo

Ni delonge konas la Esperanto-urbon Herzberg-am-Harz. Nun konatiĝu kun la Esperanto-arbo en la sud-orienta urbo de Hungario: Gyula. Fakte, pli renoma pro kolbasoj ol arboj.

## Burundaj indiĝenoj

Mi dankas al la subtenintoj de la trejnado de Instruistoj indiĝenaj, kiu okazis en Burundo en la provinco  Mwaro ĉe la lernejo Girimbabazi Tujane.  Ni dankas al UEA, ILEI, SSB (Scio Sen Bariloj).  Jen filmeto:

https://drive.google.com/file/d/1-JnxOvmo6hqs6Qoee5HK706dsAwU59Jq/view?usp=sharing

**Manirakiza Aimé Patrick**

## Jarfina ondo

Aperis la decembra eldono de *La Ondo de Esperanto* (2024, №322). Ni esperas, ke ĉi tiu 140-paĝa *Ondo* plaĉos. Elŝutu ĝin: https://esperanto-ondo.ru/Aktualaj/Ondoteko.php
La dosieroj (“pdf” kaj “ePub”) estas elŝuteblaj per viaj *nomo* kaj *pasvorto*. Se vi forgesis

ilin, skribu al ni kaj ni resendos ilin al vi. La literatura suplemento aperos fine de januaro. La unua eldono de *La Ondo* por 2025 estos preta fine de marto aŭ komence de aprilo. Nia baza abontarifo por 2025 restas la sama, ĝi ne ŝanĝiĝas depost 2007: Abonanto (15 eŭroj), Amiko (30 eŭroj), Patrono (100 eŭroj). Legu pri la pagmanieroj ĉe https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm

Halina Gorecka (eldonanto), Aleksander Korĵenkov (redaktoro)

## Niĝeria renovigo

Esperanto-Federacio de Niĝerio (EFEN) reviglìĝas danke al la oferaĵoj de la prez. d-ro Prince Henry Oguinye, vic-prez. Inĝ. d-ro Abraham Mrakpor kaj Ĝenerala Sekretario Mag. Nesta Okungbowa kaj aliaj. Malgraŭ ekonomiaj malfacilaĵoj enlande. La Prez vojaĝis al la Warri Niger-Delta regiono kun Mag. Okungbowa kaj du aliaj estraranoj. Inter la atingoj estis kontrakto kun la estrino de Akademio *Bloomfield* enkonduki Esperanton en la lernejon. La posedanto de Mgum-Lernejo de Dulingva Edukado aliĝis rete, kie jam estis pilota projekto. Aliĝis per *Zoom* mi kaj Inĝ. Emmanuel el Britio. La celo estis projekto 'kaptu ilin june' por kreskigi la asocion pere de la junularo. Oni decidis pere de Fondaĵo Canuto aligi pliajn junulojn. En marto okazos la sekva kunveno en Warri. Oni mandatis la estraron kiu oficos ĝis 2027, ĝisdatigi listojn de la membraro de EFEN kaj petis EFEN-anojn sendu ĝisdatajn telefonnumerojn aŭ retadresojn .
Oni nomumis la Prezidanton kiel komitantanon A ekde kiam li kutime ĉeestas UK kaj flegas la asocion. 12 novaj anoj aliĝis al EFEN; oni decidis krei pliajn vacap-grupojn.

d-ro Mark Ugirji Ekevhujwu, Vic Gxenerala Sekretario

## Komercistoj aktivaj tra Azio

Post sukcesaj aperoj en 2024 en la 109-a UK en Tanzanio, la 3-a KK en Koreio, la 42-a KS en Koreio, nun IKEF komencas varbi por 6-a Speciala Ekskurso 2025 en Nepalo. Se vi havas intereson, skribu al IKEF-Turismo (790862338@qq.com).

Prezidanto de IKEF, Ĉielismo WANG Tianyi, http://ikef.info

## Altpintaj proponoj el Nepalo

**Nepala Esperanto-Asocio** anoncas 12-tagan specialan ekskurson**:**

**26-a de februaro**: Alveno kaj enhoteliĝo
**27-a de februaro**: Matena vizito al Baŭdhnath kaj Pasupathinath
**28-a de februaro**: Matena vizito al Svajambhunath kaj posttagmeza vizito al Patano
**1-a de marto**: Je la 7-a horo matene forlaso de Katmanduo por la Ĉitŭan Nacia Parko; ekskurso al etna vilaĝo posttagmeze kaj tranokto en la Nacia Parko
**2-a de marto**: Observado de birdoj frumatene. Kanota veturado kaj promenado antaŭ la tagmanĝo; elefantrajdado kaj ĝangala promenado posttagmeze kaj tranokto en sama loko
**3-a de marto**: Ekveturo al Lumbini post la matenmanĝo, ekskurso en la ĉirkaŭaĵo de Lumbini templo kaj tranokto en hotelo
**4-a de marto**: Vizito al la Maya Devi-templo kaj diversaj vidindaĵoj; veturo al Palpa
**5a de marto:** Ekskurso en Palpa, inkluzive al malnova palaco; forveturo al Pokhara
**6a de marto:** Fru-matena ekveturo al Sarangkot por rigardi Annapurna kaj aliajn montojn; posttagmeze promenado de la urbo Pokhara
**7-a, 8-a kaj 9a de marto:** Reveno al Katmanduo kaj ripozo, fine adiaŭa vespero kaj foriro.

Kotizo: € 1050 por 12-tagaj ekskursoj, restadoj en bonkvalitaj hoteloj, tri manĝoj ĉiutage, ĉiuj enirpagoj en diversaj lokoj kaj tutan transportadon. Por unulita ĉambro, bv. aldoni € 300.

## Sud-Afrika pioniro en la memoro



Mi ploras informante al vi la forpason de nia karmemora Colin Beckford, kiu servis por jardekoj kiel kasisto de Esperanto-Asocio de Sud-Afriko (EASa). La agado de Colin estis kerna por EASA kaj perdi lin estas forta bato. Tamen estis multo por festi dum lia vivo inter ni kaj lia sindonemo por Esperanto. Li forpasis la 3-an de januaro 2025. Mi vidis lin ĝuste antaŭ Kristnasko por diskuti la movadon, familiojn, ekz. kiel li pasigos la kristnaskan tagon kaj la novjaron. Li estis relative forta sed malsana, Bedaŭrinde, ke li ne plu estas ĉe ni! Restu en eterna paco, karmemora Colin Beckford, vi estis ne nur samideano, sed persona amiko kaj sendube amiko de la tuta Eo-komunumo en Sud-Afriko.

Skribis Elisée Byelongo, plusendis Adjé Adjévi

## Burunda ministrino dankas pri Eo-instruado

Jen per subtitoloj estas la parolado de la Ministro de Solidareco kaj Homaj Rajtoj al la Esperantista mondo. Ĉi tio malfermas novan paĝon pri konscio kaj influo de la Esperanto-lingvo en Burundon. Jen la prelego de la ministrino.

https://drive.google.com/file/d/1cccnv1E9C1MjW-WrP3NV1DEkGvJwW7Du/view?usp=sharing

## Japana invito al legado – sumoo kaj du artikoloj

La 91-a Sumoo komenciĝis en la 12-a de januaro. Tiuj, kiuj ankoraŭ ne aliĝis, sendu aliĝon. Mi sendas du artikolojn: Neĝego en Aomori kaj Legado kaj libroj

**HORI Jasuo.** Maebaŝi, Retadreso: hori-zonto@r.water.sannet.ne.jp

## La klubo en Liaoninga atingis rezultojn

La kursanoj de la klubo venas el la tuta lando, krome el Tibeto, Honkongo, Makao kaj Tajvano per retaj Esperanto-kursoj; la klubo mirakle atingis la Esperanto-disvastiĝon en la tutlanda skalo per funkciigo de la reta Esperanto-kurso por la Ĉina Asocio de Volontuloj. La klubo sukcese faris prelegon pri Esperanto por La Novaĵa Lernejo de Liaoninga Komunika Universitato. La klubo havas Esploran Bazon de Esperanto kaj Proteino-Saliko en Interna Mongolio, kie dufoje okazis aktivadoj pri Esperanto-instruado.

S-ro Wang Hanping, vic-prezidanto de ĈEL, kiu prezidis la simpozion.

## Deklamoj invitataj en ĉina konkurso

Ĉina Esperanto-Ligo lanĉis la unuan deklaman konkurson de *Ruĝa Folio* en Esperanto organizitan kunlabore kun la redakcio de *El Popola Ĉinio* kaj Zhejiang-a Komunikada

Universitato, la konkurso celas doni pli da ŝanco por lernantoj, komencantoj kaj amatoroj de deklamo. Viaj partopreno estos bonvenaj En la konkurso estas du kategorioj: internacia grupo kaj ĉina grupo. La internacia grupo estas por ne-ĉinaj esperantistoj. La lingvo por internacia grupo: Esperanto aŭ la ĉina. La premioj estas:

**Unua premio** (nur unu persono): librokupono valora je 1000 juanojn
**Dua premio** (du personoj): librokupono valora je 500 juanojn por ĉiu premiito
**Tria premio** (kvin personoj): librokupono valora je 300 juanojn por ĉiu premiito

La librokuponoj povas esti uzataj nur en la reta librovendejo de Ĉina Esperanto-Ligo. La gajnontoj ricevos ankaŭ paperajn atestilojn de la konkurso. Kanditatoj preparu horizontale filmitan videon kun maksimuma daŭro de 5 minutoj, en Esperanto aŭ la ĉina, kun la temo *Bela Ĉinio, Bela Mondo*. En la video, kanditato devas montri sian vizaĝon, vestiĝi taŭge, kaj la voĉo devas esti aŭdata klare.
La video estu sendita al: elpopolachinio@126.com kiel aldonaĵo en formato MP4. En la mesaĝo necesas aldoni la jenajn informojn: nomon, ŝtatanecon, stud/laborejon, okupon, tekston kaj aŭtoron de la deklamaĵo, enhavon kaj fonton de la teksto.
Retejo: http://esperanto.china.org.cn/2024-12/11/content_117600490.htm
El Popola Ĉinio：http://espero.chinareports.org.cn/2024-12/11/content_117600513.htm

Chen Ji, Ĝenerala Sekretario de Ĉina Esperanto-Ligo

## Balkana kunlaboro

Partoprenis pli ol 16 esperantistoj el Albanio, Bosnio, Bulgario, Hungario, Kroatio, Rumanio, Serbio kaj Ukrainio. Estis prezentitaj la regionaj eventoj
1. Ronda Tablo pri Arterfarita Intelekto en Sarajevo, la 20-21-an de februaro 2025
2. La 13-a Kongreso de kroataj esperantistoj en Slavonski Brod en majo 2025
3. La 2-a Adriatika Feriado en Prvić Luka apud Šibenik en junio 2025
4. La 58-a Kongreso de ILEI kun la temo *Artefarita Intelekto kaj Lingvolernado*, Beogrado, 19-26 julio 2025, kun postkongresa buskaravano al la UK en Burno, Estis raportoj pri la jam okazintaj Zamenhofaj Tagoj en Albanio, Aŭstrio (pere de la bulgarino Raja), Kroatio, Hungario, Rumanio, kaj kursoj en Serbio. Oni diskutis pri la planata vojaĝo de Josip Pleadin tra Balkanio kaj la kongreso de nevidantoj en Grezijono k.a.).

A;kroĉita trovu la plejlastan UN-bultenon de UEA.

========= vortoj: 985 =========

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj
Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj, Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**La kvardek kvar numeroj de 2024 nun aperas tie, kune kun la kolekto el 2023**

**ALDONU AŬ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn, kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.